

Novajaĵoj Tamtamas

横浜エスペラント会のエスペラント文会報

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

TIEL OKAZIS

HAMA-RONDA VESPERO

*la 15-a de junio, 17h00-19h00, ĉambro 601

Ni gastigis s-inon SUZUKI Masumi kaj ŝian edzon Kunio. Ŝi faras radseĝan vivon post akcidento kaj enhospitaliĝo en 2005, sed poste jam faris dufojajn mondovojaĝojn sur t.n. Paco-ŝipo, kun sia edzo, en 2009 kaj 2012. Ŝi rakontis pri tiuj vojaĝoj, kaj ankaŭ pri Esperanto-kurso ktp., sur la ŝipo. En la unua vojaĝo, ŝi havis 58 fojojn da kurso, kaj vizitis esperantistojn ĉe kelkaj el la havenoj. En la dua vojaĝo ne estis kursoj, sed en volontulaj grupoj por Esperanto, ŝi gvidis Esperantajn kantojn ktp.

Entute, 25 personoj estis en la Hama-Ronda Vespero, kaj poste, kelkaj kun ges-roj Suzuki vizitis restoracion kaj kune vespermanĝis.

NIAJ PLANOJ

PREZENTO DE SOMERAJ SPERTOJ

*la 7-a de septembro, 15h00-17h00, ĉambro 604

Ni prezentu nian sperton en la venonta somero (kaj la pasinta printempo)! Via prezento estas atendata!

RUDIMENTA KURSO DE OKTOBRO

*de la 3-a de oktobro, 20:00-21:30, en unu el la ĉambroj

Ĉi-foje ni havos kurson en vesperaj horoj.

ĈE LA REGULA KUNVENEJO

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama, okazas jenaj klasoj.

*Rudimenta kurso

*Regulaj Klasoj en sabato: Klaso por legado de "Tra dezerto kaj praarbaro", Klaso por legado de "Vivo de Lanti" / Jokohama Salono / Daŭriga kurso

*Regula Klaso en merkredo por legado de "Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj".



■ Eldonas Doi Hirokaz ■ Redaktas la organa fako de JER: Sibayama Zyun'iti
 ■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
 ■ Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>
 ■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

91a Legokunveno

En la 1-a de junio okazis legokunveno, kun 5 venintoj kaj 2 paperaj kontribuoj. La titolo de la legita libro estas

“Ne senditaj leteroj el Japanio” de Spomenka Ŝtimec

Nesenditaj leteroj el Japanio, Spomenka Ŝtimec

Mizro Iwaya

La aŭtoro vizitis Japanion cele al (eble) PIF, Pupteatra Internacia Festivalo, en 1988, kiu okazis ĉirkaŭ Nagoya. Post tio, ŝi vizitis preskaŭ ĉiun parton de la lando helpate de esperantistoj-samideanoj. Tiu ĉi libro estas la raporto pri tiu vojaĝo. Tio okazis antaŭ kvaron-jarcento, sed mi ankoraŭ nun trovas multe da nomoj de miaj karmemoraj amikoj en ŝia vojaĝo. Tio estas unu interesa flanko de la libro.

Ŝia verko konsistas el spertitaj epizodoj kaj aŭditaj eldiroj dum la vojaĝo. Kelkaj klarigoj estas freŝaj ankaŭ al ni japanoj, ekz. pri *Sugawara Michizane* (菅原道真) kaj *Po-Chui-l* (白居易). Sed ĝenerale dirite tiu libro aspektas kolekto de simplaj epizodoj. Tiurilate mi memoras du kontrastajn recenzojn pri la libro “Diverskolore” de Trevor Steele, kiuj troviĝas en:

<http://esperanto.org/Ondo/Recenzoj/R-steel3.htm>

Tie Sten Johansson definitive pli alte taksas nun tematan libron dirante, “... Ŝtimec kreas literaturon el ĉiutagaĵoj, Steele emas fari banalaĵon el mondaj problemegoj”. Mi legis ambaŭ librojn, sed mi ne povas konsenti kun lia opinio. Tute malsamas la kategorio de ilia verkado: pristudo kaj pripensado. La recenzo de Valentin Melnikov montriĝas al mi pli simpatiiga, dirante “... ĉar li (Steele) pensas mem (tiun kvaliton mi pleje aprobas!) kaj liberas de ĉiuj mensaj ŝablonoj kaj katenoj.”

Onidiroj abundas en tiu ĉi libro, sed ne mankas ankaŭ ŝia originala vidpunkto. Interalie ŝia sperto en Imazu, Somera Esperanto-Kurso, tiris mian atenton. Ŝi vidis “rompadon de akvomelono” kaj rifuzis partopreni en tiu ludo, ĉar ĝi aspektis tute malpaca. Ŝi nomis tiun epizodon “konflikto de kulturoj”. Ja tia percepto estas ne malhavebla ankaŭ al

gastigantoj.

Laste mi aldonas informojn pri la menciitaj libroj:

Nesenditaj leteroj el Japanio, temlibro de nia unua legkunsido en 1990

Diverskolore, temlibro de nia 69a kaj 70a legkunsido en 2007 kaj 2008

Neskribitaj aferoj en Japanio

SIBAYAMA Zyun'iti

En la broŝuro “Nesenditaj Leteroj el Japanio”, s-ino Spomenka ŜTIMEC priskribas sian vojaĝon tra Japanio en 1988, eldonita en 1990 de la “japana onklo”, s-ro MORI Singo, ŝia korespondanto ekde ŝia studenteco. La broŝuro, kiun mi efektive legas, datiĝas je 1995 por la 3-a eldono – iom da komplika sento min vualas, ĉar en 1991, ŝia hejmlando, Jugoslavio, eniris en tragedian militostaton. Ŝi ne sciis, ĝis hokajda samideano rakontas, ke inter Sovetunio (tiama!) kaj Japanio estis lando-apartena konflikto. Sed ni, kiuj siatempe vidis ŝin, tute ne sciis, ke okazos lando-apartena konfliktaro en ŝia hejmlando.

Mi legis la libron en 2013, post la Hukuŝima akcidento en 2011, kaj iritis min ŝia skribo, pri la malplia riskosento inter japanoj por la Ĉernobila Akcidento. Kion ŝi timis, kion multaj tiamuloj japanaj ne timis, fakte okazis...

Ŝi pasigis tre aktivajn, agemajn tagojn en Japanio, helpe de samideanoj. Tial la tagoj, en kiuj ŝi ne havas specialajn fendaĵojn kaj ripozas, ekzemple en Oosaka, iel trankviligas min, la leganton, kun same ripoza sento.

Unu el la mankosentoj al mi estis, ke ŝi nur supraĵe notas nomojn de diversaj pupteatraj spertoj, kion rigardi estis unu el ŝiaj celoj. Ŝi povus, kaj devus priskribi pri pupteatro, ĉu tipe japana, ĉu tipe tutmonda. Pri tiuj ĉi neskribitaj aferoj mi iom bedaŭras.



leginte “NESENDITAJ LETEROJ EL JAPANIO”

TANIGAWA Hiroshi

EN HIROŜIMO

En Hiroŝimo ekster la Pacparko la aŭtoro vidis la monumenton de la koreaj viktimoj de la atombombo. Ŝi skribis;

En la tago de la atombombado en Hiroŝimo laboris 30,000 militkaptitoj el Koreio. Ili ĉefe laboris en fabrikoj. El ili ruinoj forbrulis pli ol 20,000. Sed, ĉar ili ne estas japanoj, la urbo Hiroŝimo ne permesis havi sian monumenton en la Pacparko. Iliaj samlandanoj rajtis starigi la monumenton nur ekster la Pacparko. Mi ne povas tion pardoni al Hiroŝimo. (p.17, 18)

Rilate la supran artikolon mi iomete esploris kaj la rezulton resumas jene; (Vikipedio, Hiroŝima-Urba Arkivo, Hiroŝima-Gubernia Centro de Koreaj Enjapaniaj Rezidantoj)

La Hiroŝima-Gubernia Centro de Koreaj Enjapaniaj Rezidantoj konstruis en 1975 cenotafon por la koreaj atombomb-viktimoj kun la titolo; “La Cenotafo por la Spiritoj de Princo Lee kaj 20 mil samnacionoj”.

La loko estis kie Princo Lee, ido de la Korea Dinastio, grave vundita de la atombombo, estis savita.

Vikipedio skribas: Ĉar tiam oni ne trovis taŭgan lokon en la Pacparko, la Urbo neniel pro ia diskriminacia sento, sed eĉ bonvole rekomendis la supre menciitan lokon. Kaj tamen okazis kritiko je diskriminacio. Laŭ la interkonsento de la Urbo kaj la rilataj asocioj, la Hiroŝima-Gubernia Centro de la Koreaj Enjapaniaj Rezidantoj translokis la monumenton

en 1999 en la Pacparkon.

Iom rilate la aferon, mi atentis la artikolon de la Ĵurnalo Asahi, 2/maj; La urboestro de Hiroŝima protestis la registaron, kiu neis la subskribon al “la Propono Por la Komuna Komento por Ne-uzo de la Nukleaj kaj Kontraŭhomaj Armiloj” (La proponon faris, por akceli la neuzon de la nukleaj kaj kontraŭhomaj armiloj, la Preparkomisiono por Revizii la Internacian Konvencion por Nedifuzi la Nukleajn Armilojn.)

SUR LA INSULO KYUSYU

Pripensante la lastatempan konflikton inter Japanio kaj Ĉinio min impresis; S-ro Mori Singo apartenas al tiuj raraj japanoj, kiuj multon faras por malgrandigi la abismon inter Ĉinio kaj Japanio. (p 26);

HALTOJ EN NAGOYA KAJ OOSAKA

La aŭtoro vizitis La Nagoya Palacon de Elektro, kie estas konstruita la porinfana reaktoro-modelo, kaj oni klopodas konvinki la spektantojn pri sendanĝero de nuklea energio. Sed atentigante ke junaj dommastrinoj post Ĉernobil ne tro fidas atom-energion, la aŭtoro skribis;(p.32)

Kelkajn tagojn poste mi spektos en Norda Japanio teatraĵon de amatora grupo por kiu ekologio estas plej akuta mondproblemo. Pli konvinke ol la riĉa Muzeo efikis ilia rakonto en la teatro. (fino)

BELETRO

Tri-frazaj Monologoj

AIDA Yayoi

La plej impresa loko en la 5-taga-rondvojaĝo en Kjuŝu kiun mi kaj mia edzo ĝuis en aprilo estis Ĉiran situanta en la sudo de la gubernio Kagoŝima, kie estis aerbazo de la japana armeo dum la dua mondmilito. En la ekspoziciejo mi ne povis premi larmojn vidante la fotojn de junaj soldatoj sinpretigataj al morto por defendi patrujon. Sen nenia dubo pri militismo, ili forflugis al malamikaj ŝipoj laŭ la ordono de tenoo kun benzino nur por iro kaj pereis vane.

.....
Dum la vojaĝo, el busa fenestro ni ĝuis belan ĉenon da montoj kun cedroj (kriptomerioj), kverkoj, pinoj, paŭlovnioj, k.a. Anstataŭ sakurfloroj, kies kulmino frue finiĝis ĉi-jare, ofte videblis visteriaj grapoloj inter helflavaj skuiĝantaj folioj de kverkoj. En la vento ŝajne aŭdiĝis voĉoj de la pereigitaj soldatoj, kiuj postlasis testamenton por familianoj antaŭ la sturma atako.

lun matenon unuafoje post kelkaj monatoj mi promenis laŭ marbordo de Zuŝi kun mia edzo, ĉar li estis ofte demandita de siaj geamikoj pri mia sanstato kiam li promenadis sola. La vento estis forta sed matena strando estis komforta kun la Monto Fuĵi fore ŝvebanta en aero kiel la fono de pejzaĝo. En tia bela ĉirkaŭaĵo, ĉu mi sukcesos malpli pezigi mian korpon kaj malgrasigi internan akumulaĵon per daŭra praktiko de promenado?

La kialo de mia kelkmonata ĉeso de promenado estis ne nur pro vintra malvarmo sed ankaŭ pro okupiteco por forĵeti mian havaĵon ne necesan, nek utiligeblan. Estas malfacile, tamen, difini kio estas ne necesa kaj kio estas ne utiligebla, ĉar la valoro de aĵoj dependas de

individua koncepto. Mi ne povas simple forĵeti dek mil leterojn kaj poŝtkartojn ricevitaĵojn de miaj parencoj, geamikoj, konatoj, studentoj, se diri alivorte, karaj kunvojaĝantoj en mia vivo.

Relegado de la leteroj en la pasintaj jaroj estis interesa sed temporaba laboro konsumi energion. Tio similas al grimpadado, kiu postulas penon sed fine donacas ĝojon kaj kontenton sur la supro. Mi renkontis tute forgesitan min mem tra la montoj de la leteroj, kaj konfirmis kun kortuŝo, ke multe da amoj kaj kuraĝigoj en tiuj leteroj helpis min en profundigo de mia penso kaj sento.



NOVAĴOJ JOKOHAMAJ

SIBAYAMA Zyun'iti

Jokohamanoj bedaŭru malsukceson en la “Mondaj Heredaĵoj”

En junio, la japana popolo ĝojis ĉar UNESKO decidis, ke Monto Fuĵi kaj ĉirkaŭaj kulturaj vidindaĵoj estas registritaj kiel la 17-a Monda Heredaĵo en Japanio. Kaj kelkaj el la japanoj bedaŭris, ke la antikva metropolo japana, Kamakura (鎌倉) malsukcesis esti alia Monda Heredaĵo. Ankoraŭ malmultaj scias, ke ankaŭ en la urbo Jokohamo estis kandidatoj de tiu Monda Heredaĵo, nome la templo Syomyozi (ŝoomjooĝi / 称名寺) kaj parto de la montopasejo Asaina (朝夷奈切通).

Nu, Kamakura estis, post Kioto kun la imperiestrejo, ĉefurbo de Japanio de la fino de la 12a jc. ĝis la mezo de la 14a jc., kiam regis samurajoj (t.e. militistaro). Dumtempe, la imperiestra dinastio restis sen vera potenco. Sed post tio, la imperiestra familio reprenis potencon, kaj Kioto refariĝis la metropolo.

Kamakura havis motivaĵon por la Monda Heredaĵo,

ĉar en kaj ĉirkaŭ la urbo restas diversaj postsignoj de tiu samuraja epoko. Tre fama estas la Granda Budhostatuo kaj la ŝintoisma sanktejo Curugaoka-Haĉiman, en la urbo mem. La templo Syomyozi, kelkajn kilometrojn for de la nuna urbolimo de Kamakura, estis fondita en la mezo de la 13a jarcento, de parenco de tiama samuraja klano. La montopasejo Asaina estas unu el la 7 montopasejoj al tiama urbocentro de Kamakura, ĉirkaŭita de montejo.

Kun tiuj kaj aliaj kulturaj heredaĵoj, oni esperis akiri statuson de la Monda Heredaĵo, sed en la lasta aprilo, Kamakura forfalis el kandidateco, interalie pro la malmulto de la restaĵo de antaŭ 8 jarcentoj, i.a. ne restas rekta postsigno de iama samuraja registaro; fakte post la forfalo de la urbo Kamakura kiel metropolo, malmultaj domoj restas, kaj lastatempe, modernaj domoj svarmas en la distrikto. Tiuj estis negativaj faktoroj por esti Monda Heredaĵo.

